

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de Esperanto-Societo Kebekia

Julio 1986. Numero 3-a. Jarkolekto 1-a.

BUTONOJ:

Fine
pretaj



NUR

1\$



redaktore

Nu, je la plej dika *La Riverego* ĝis nun. 12 paĝoj, el kiuj la duono pritraktas la ĉi-numeran temon, lokaj kluboj.

Kaj unuafoje, mi ricevis kontribuojn, ...kiujn mi estis aparte petinta. Ne forgesu, ke vi jes povas reagi aŭ kontribui al tiu revuo.

Tamen, ŝajnas, leginte tiun ĉi revuon, ke la Kebekiaj (aŭ Kebekaj ?) lokaj kluboj ne tiel bone fartas. Kebeko ne plu ekzistas, Otavo, apenaŭ. Ibervilo ne vere estas klubo. Kaj Montrealo frontas problemojn, ĉefe ĉar la tieaj plej aktivaj homoj laboras por ESK kaj por KEA. Sed vi povos pli legi en la venontaj paĝoj.

Kaj pripensu pri tio, kion vi estos legintaj. Ĉar ni pridiskutos tiun temon, kaj aliajn, dum la venonta ĝenerala kunsido, en aŭgusto. Legu la programon (p. 4-5) kaj skribu krucon.ĉe via kalendaro.

Cetere, dum la ĵusa K.E.A.-kongreso, en Otavo, ESK invitis KEAn kongresi en 1987 en Maskuto (Saint-Hyacinthe). Tie estis la unua esperantisto en Kanado. Do jen laboro por ni. Ĝis aŭgusto.

Saluton.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Ĝi aperas trimonate. ISSN 0830-9574.
Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Québec et du Canada: 1^{er} trimestre 1986.

Pri la enhavo de siaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Redaktoro: Sylvain Auclair

Senpage por la membroj de ESK. Por la aliaj:
jara abono: 5\$, aerpoŝte: 6\$.

UEA-kodo: Kebk-d.

Adreso: Société québécoise d'Espéranto

C.P. 126, succ. "Beaubien"

Montréal, Québec

KANADO H2G 3C8 tel: (514) 495-8442

Kebekio aŭ Kebeko ?

Ĉu nia Societo misnomiĝas? En la marta numero de *Esperanto*, paĝo 48-a, troviĝas *Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto*, en kiuj la Akademio rekomendas pri la landnomoj. Estus certe tro longe rekopii la tutan tekston. Tamen ni skribu la 4-an paragrafon, kiu plej trafe koncernas nin.

4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" (...) (-io), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Tiel la vorto *Kebekio* ne estus ĝusta. Plie, laŭ la dua paragrafo, ni devas uzi *la plej internacian landnomon*, okaze de konflikto. Kaj la nomo de nia provinco estas *Québec*, ne *Québeque* aŭ io simila...

Do, nia Societo devus nomiĝi *Esperanto-Societo Kebeka*, ni estus *Kebekanoj*, loĝantaj en *Kebeko*, kaj kelkaj el ni, loĝantaj en *Keberkurbo*, (aŭ *urbo Kebeko*, kiel la ville de Québec), estus *Kebekurbanoj*.

Mi eĉ skribis al D-ro Albaut, prezidanto de la Akademio de Esperanto, pri tiu. Kaj li aprogas la ĵusan interpreton. *Fremda Esperantisto aŭdante aŭ legante en sia lingvo la nomon Québec (aŭ simile, ekz-e Kvebek en la Rusa) mem forĝos la nomon kiel Kebeko aŭ Kvebeko. Male legante Kebekio li serĉos en sia atlaso aŭ vortaro.*

Alia argumento favora al tiu starpunkto estas la fakto, ke la provinco estas mondscale multe pli konata ol al urbo, kaj do bezonas pli simplan kaj internacian nomon. Kaj ni derivu la nomon de la urbo el tiu de la provinco. Eĉ se historie okazis la malo...

Kion vi pensas pri tio?

(Vi povas ricevi kopion de la artikolo kaj de la letero de D-ro Albaut sendante al ESK jam afrankitan koverton. Aŭ vi vidu ilin dum la jarkunveno.) □

E.S.K.e

ĜENERALA KUNVENO

La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia oficiale invitas la membrojn de tiu Societo al la ĵara ĝenerala kunveno. Ĝi okazos sabaton, la 23-an de aŭgusto 1986, ekde la 13-a horo, en la kelo de 6358, rue de Bordeaux
Montréal, Québec

Ĝi daŭros ĝis la vespermanĝo, aŭ eble finos pli frue, se ni rapide trairas la tagordon.

Pri la vespermanĝo komuna kaj la sekvanta vespero, la ĉeestantoj mem tiam decidis.

Jen la tagordo de tiu ĝenerala kunveno, tia kia decidis la estraro de ESK, dum sia regula kunveno okazinta la 17-an de junio 1986, en la sama loko kie okazos la ĝenerala kunveno:

0. Malfermo

- a) Elekto de prezidanto kaj protokolanto
- b) akcepto de tagordo
- c) akcepto de la protokolo de la lasta kunveno

1. Raportoj

- a) de la prezidanto (N. Fleury)
- b) de la sekretario-kasisto (S. Auclair)
- c) pri la Amikoj (P. Mongeau)
- d) pri *La Riverego* (S. Auclair)
- d) pri la Ibervila renkontiĝo (S. Auclair)
- e) pri Ekspozicioj (P. Mongeau)
- f) pri la butonoj (S. Auclair)

- g) pri la Jubileo (S. Auclair)
- ĝ) pri la memuaro (la estraro petas Pr. P. Collinge bv. zorgi pri tiu)

Post ĉiu raporto estos diskuttempo, por fari demandojn kaj decidojn.

2. Diskutoj

- a) Jubileo: projektoj kaj respondeculoj
- b) ESK Montrealecas: kiel tutKebekiigi ?
- c) Lokaj kluboj: problemoj kaj solvproponoj.
- e) "Socialaj kunvenoj".

Se estos sufiĉe da homoj, ni dividiĝu en diskut-grupojn, kaj poste okazu plenkunsido; se ne, ni diskutos la temojn unu post la alian.

3. Venontaj renkontiĝoj

4. Aliaj

5. Fermo

Notu, ke tiun tagordon oni povas ŝanĝi nur se konsentas pri la ŝanĝoj ĉiuj partoprenantoj.

Sylvain Auclair
por la estraro.

Ni ŝatus, ke vi antaŭanonciĝu. Dankon.

Lokaj

Ŝerbruko

Trefflé Mercier

Fine de majo okazis la 50-a regula estrarkunsido de Ŝerbruka Esperanto-Societo (ŜES). Tio ja montras, ke nia loka klubo ekzistas de almenaŭ kvin jaroj, ĉar kunvenoj okazas de septembro ĝis majo kun neformalaj renkontiĝoj dum la someraj monatoj.

Pasintece, la kunvenoj okazis en universitata ĉambro, kiam la partoprenantaro superis dek. Sed nuntempe kun kelk-ses aktivuloj, ni preferas esti akceptataj en la hejmoj de tiuj membroj, kaj tion ĉiu faras siavice.

Niaj kunvenoj - okazantaj la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato, de septembro ĝis majo - tradicie komenciĝas per la aferkunsido. La dua parto konsistas el sociaj eroj.

La tuta aranĝo okazas en Esperanto, eĉ se por kelkaj anoj aŭ vizitantoj tio rezultiĝas iom streĉiga. Por ni tiu rimedo estas tre efika por altigi la lingvan kvalito-nivelon en nia Societo.

En Ŝerbruko oni spertas la saman malfacilaĵon kiel aliloke rilate varbadon. Allogi novan sangan estas senĉesa defio. La plej bona instrumento sendube estas la lingvo-kurso - kaj starigi ĝin estas mem defio. Sed, kvankam ni ja sukcesas okazigi kursojn, ni ankoraŭ ne sukcesas kreskigi la membraron. Estas facile klarigi tion: niaj kursoj nuntempe okazas en la loka franclingva universitato dank'al la sindediĉo de ŝesano Pierre Collinge kaj la plimulto el la kursanoj sekvas la kurson ne pro idealistaj motivoj

Kluboĵ

sed la rezultantaj universitataĵ poentoĵ. Tiuj universitatanoĵ plejmulte ne restas en Ŝerbruko post siaĵ studoĵ sed reiras heĵmen esterregione.

Tamen tiu situacio esble estonte ŝanĵiĵos. Ekde septembro, Esperanto estos instruata ankaŭ en loka mezlerneĵo (Ecole secondaire Le Triolet) sekve de la lerta laboro de ŝesanoĵ Bruno Pelletier kaj G erald C ot e. Tiun novan agnoskitan kurson jam certe frekventos unu grupo kun pli ol tridek studentoĵ. Tiuj geĵunuloĵ plejparte loĵas en la ŝerbruka regiono, do eble ni komencos varbi novajn membrojn el tiu "plantovarteĵo".

Edukado

Ŝajnas, ke la ĉefa agado de SES koncentriĵas pri edukado. Antaŭ kelkaj jaroĵ, ŝesano Pierre Collinge ellaboris plej profesi-nivelaj memuaron pri la enkonduko de Esperatno en la Kebekiajn lernejojn. Poste, Bruno Pelletier kaj G erald C ot e, helpe de Prof. Collinge kaj mi, ellaboris kursplanon por apogi peton enkonduki Esperanton en lokan mezlerneĵon. Tio sukcesis. La tria eduka projekto, nun konsiderata, estas intrumedoto por Kebekiaj mezlerneĵoĵ. Ebla kvara projekto estus la okazigo de klerigaj seminarioĵ por instruistoj, kiuj dezirus enkonduki Esperanton en siajn lernejojn. Ĉar la unua paŝo estas farita. la ŝerbruka kursplano jam estas akceptita de la Kebekia Ministerio pri Edukado. La dua paŝo estas liveri taŭĵan metodon. La tria, montri al profesiaĵ instruistoj kiel instrui la lingvon.

Jen kio plej karakterizas ŜESon. Malgranda rondo sed altkvalita (laŭ "modesta" takso de la aŭtoro).

Niaj paŝoj estas etaj sed konstantaj, kaj iras antaŭen. Krom la menciitaj nomoj, en nia grupo ankaŭ membras Aurore Boisvert, Monik Boucher, Monique Cambon, Dominique Collinge, Germaine Collinge, Jean-Paul Collinge, Cécile Côté kaj Paul Poitras.

Ĉiu sesano profitas ĉi tiun okazon por varme saluti la membrojn de ESK kaj deziri al ili plej agrablajn someron. Ĝis revido! □

Montrealo

Montrealo estas la plej granda urbo en Kebekio, kaj estas iel normale, ke ĝia Esperanto-klubo estas tre grava.

Antaŭe, la Montreala Esperanto-Klubo (MEK) kunvenadis en iu ĉambro de la Botanika Ĝardeno. Post la alveno de Zdravka Metz kaj Normand Fleury, kaj ilia aĉeto de domo, la klubejo iĝis la kelo de la *Montreala Esperanto-Domo*.

La klubo renkontiĝas du fojojn en monato, eĉ dum la somero (unuajn fojojn ĉi-somere). Venas ĉiujfoje deko da homoj, ne ĉiam la samaj. Ili konversacias, sekvas progresigan kurson, kaj eĉ "butikumas", ĉar samloke troviĝas la librovendejo de K.E.A.

Problemo estas ke multaj Montrealaj aktivuloj estas tre okupitaj alinivele: ili laboras por ESK kaj por K.E.A. Ili tial ne havas la tempon tre prizorgi la kluban vivon.

Tial kelkaj membroj, ĉefe junaj, malaperis dum la lastaj kelkaj jaroj. Ili verŝajne trovis la klubajn kunvenojn ne tiom interesaj aŭ utilaj.

De kelkaj jaroj ne okazis en Montrealo KLUBA kurso de Esperanto. Pasintan aŭtunon estis kurso en Universitato Montreala, sed ĝin organizis du unuop-

uloj, Louis Charbonneau kaj Sylvain Auclair. Kaj, kiel kutime, la kursanoj malaperis...

En MEK mankas forta estraro, kiu povus starigi kaj plenumi projektojn. Tial ne okazas multo krom la ordinaraj klubaj kunvenoj. Tiuj estas tre gravaj, sed ne antaŭenigas la Montrealan movadon. Esperantistoj jes ĉeestas foirojn aŭ manifestaciojn, sed tio estas pro la laboro de unuopuloj aŭ de ESK.

Tamen, la Montreala movado sufiĉe bone fartas. Sed ĉiam estu loko por plibonigo, ĉu ne? □

E.K.O.M.

U. Paul Ronald

Esperanto-Klubo de Okcidenta Montrealo fondiĝis en 1972, ne pro ia skismo kun la Montreala klubo, sed simple pro la granda distanco inter la okcidento de la insulo kaj Rosemont, kie kunvenadis tiu. Rilatoj inter la du kluboj ĉiam estis bonaj.

Ni ne estas multaj. Kunvenas ĝenerale 5 aŭ 6 kaj tio estas tre alta proporcio de la tuta membraro. Nuntempe ni kunvenas en la hejmoj de la membroj laŭvice, kaj ĝenerale estas du aŭ tri semajnoj inter la kunvenoj. Ili okazas merkrede aŭ ĵaŭde, por ke plej multaj membroj povu ĉeesti. La membroj devas informiĝi por scii la lokon kaj tagon.

Dum la kunvenoj okazas diskutoj pri movadaj okazantaĵoj aŭ artikoloj en Esperantistaj gazetoj, kelkfoje prelegoj kun aŭ sen lumbildoj; kartludo aŭ *Scrabble*® de tempo al tempo; diskutoj, ktp.

En la lastaj kelkaj jaroj okazis neniu kurso, sed ni jam eklaboras por ke okazu iu en aŭtuno. □

Ibervilo

En Ibervilo, kie ni laste renkontiĝis, la situacio estas neordinara. Kiel paroladis Louis Langlois, je la bonvenigo al la renkontiĝo, ilia grupo prave nomas sin *Ibervila Esperanto-Ligo*. Kaj ne klubo.

La afero estas, ke membras en ĝi homoj, kiuj tute ne ĉiuj loĝas en la apuda regiono. Ili fakte estas dise tra la mondo. Kaj ligas ilin nur la tre bela bu!teneto de sia Ligo, *Verdinsuleto*.

Tiun agadon ni tute ŝuldas al la laboro de S-ro Edgar Langlois kaj de liaj familianoj. Li starigis la Ligon.

Sed dum la bonveniga parolado, Louis Langlois ankaŭ dankis al aliaj homoj: al Prof. Pierre Collinge, kiu, per la kurso, kiun li donis en Saint-Jean-sur-Richelieu, ebligis la Ligon, kaj al Zdravka Metz kaj Normand Fleury, kaj al la Montreala Esperanto-Klubo, dank'al kiuj la Langlois povis praktiki la lingvon. *Sen ili*, diris Louis Langlois, *ni ankoraŭ estus krokodilantaj*.

Sed, kiel kutime, plej multaj el tiuj, kiuj frekventis la kurson en St-Jean, ne estas membroj en la Ligo. Ili forvapiĝis. Bedaŭrinde. □

Kebeko

En la lasta *la Riverego*, mi menciis, ke estas klubo en Kebeko. Tio ne estas tute vera. Jes *estis* klubo, sed ĝi tute ne plu aktivas.

Victor C. Jaar, *animo* de la Kebeka Esperantujo, pro familiaj kaj profesiaj devoj, grandaj, ne havas tempon organizi lokan Esperanto-vivon. Kaj ŝajne neniu povas lin anstataŭi. Bedaŭrinde.

Estas tamen kelkaj Esperantistoj en Kebeko, sed ili ne klube kunvenas. La antaŭ-du-jara ESK-renkontiĝo en Kebeko, kiu havis i.a. kiel celon revigligi la tiean Esperanto-vivon, ne sukcesis tiurilate. □

Otavo

Otava Esperanto-Rondo spertas grandajn malfacilaĵojn. Oni klarigas ilin dumaniere: laŭ kelkaj, estas pro la *diktatoreca sinteno* de ĝia eksa prezidanto, Manuel Campagna. Sed laŭ tiu, temas ĉefe pri konflikto inter generacioj.

Laŭ Jean Forgeau, *la klubo bone funkciis kiam ĝi estis gvidata de Lorcan O'Huigin kaj la ge-Matte. Poste Manuel Campagna fariĝis prezidanto. Sub lia gvido, la membraro de OER multe kreskis, ĝis tridek. Li eksiĝis lastoktobre. Kaj nenio plu.*

Kontraŭe, laŭ Manuel Campagne, la malnovaj membroj ne kapablas akcepti junajn ideojn kaj gvidadon. Li demandas, kial ĈIUJ anoj de la iama Lisgarlicea klubo forlasis la movadon.

Sed ni forgesu la pasintecon. Dum la kongreso de K.E.A. en Otavo, la ĉeestantaj Otavanoj decidis restarigi sian klubon. Ili kunvenos ĉi-somere, kaj elektos novan estraron. Problemo kun la iama OER estis ke la prezidanto preskaŭ ĉion faris. Tio devas ŝanĝiĝi.

Bonan ŝancon. □

Atentu pri

butonoj

La butonoj pri la Jubileo estas fine pretaj. Vi povas tuj mendi ilin ĉe ESK. Ili kostas po 1 \$, plus la sendokostoj. Se vi mendas pli ol 9, ili kostas nur po 0,70 \$.

Pensu, ke verŝajne estas en via familio iu kiu kolektas tiajn butonojn. Estus bela donaco, kiu iel diskonigus Esperanton.

Kompreneble, ni vendas la butonojn ĉe la ĝenerala kunveno de ESK. □

se vi ne estas membro

Eble vi ne estas membro de Esperanto-Societo Kebekia kaj tamen ricevis - senpage - ekzempleron de tiu ĉi bulteno. ESK provas diskonigi sin. Do se vi ŝatas tiun bultenon kaj volas helpi al la Kebekia movado, ni invitas vin fariĝi membro de ESK. Vi trovos aliĝilon. Ĉar membreco validas por plena jaro, vi ankaŭ ricevos la pasintajn *la Riveregojn*.

Vi povas ankaŭ decidi simple aboni la bultenon. Tio kostas 5 \$ jare. Vd nian adreson en paĝo 2-a. □